

KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Jaro 41-a BRAZILIO, JANUARO-FEBRUARO-MARTO 2017 N-ro 165

“Amu vian Dion per via tuta koro
kaj per via tuta animo kaj per via tuta
menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”
JESUO (*Mt.*, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte
rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo.*
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante
unu la alian, la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.”
ZAMENHOF. *La Espero.*

ENTREPRENO EL AMO, DEDIĈADO KAJ FRATECO

Hejmo Frateco Maria el Nazereto estas porŝirmada filantropa institucio el Belorizonto, ĉefurbo de ‘Minas Gerais’, sudorienta brazila subŝtato. ‘Porŝirmada institucio’ estas esprimo nuntempe uzata por nomi rifuĝejojn, akceptantaj malriĉajn geknabojn kaj gejunulojn, portantaj movmalsanon el cerba kaŭzo, konata kiel cerba paralizo.

La celo de tiu Hejmo estas prizorgi kaj helpi homojn en tiaj kondiĉoj, tio estas, tute dependantajn, forlasitajn kaj devenantajn el malriĉaj familioj pere de institucia ŝirmado.

Temas pri civila kaj religia asocio, malfermata al la sociaj bezonoj kaj ankaŭ subtenanta la disvastigon kaj studon de Spiritismo. En la kampo de la socia asistado, ĝi helpas al la malriĉaj familioj de la regiono per distribuado de nutraĵoj kaj vestaĵoj, informado al gravedulinoj krom provizi ĉi-lastajn je tolaĵoj por ties beboj.



Emerson Oliveira Pedersoli:
psikologo kaj spiritisma preleganto.

IOM DA HISTORIO

Laŭ Emerson Pedersoli, unu el la direktoroj de la Hejmo, la historio de tiu institucio komenciĝis en la 1980-aj jaroj, per iniciato flanke de grupeto da homoj frekventantaj Spiritisman Centron Simono Petro.

El inter la diversaj taskoj ofertataj de tiu Centro, unu el ili estis la estiĝo de ‘grupo de vizitado’ al alia filantropa spiritisma institucio el Belorizonto ‘Porasista Nukleo Vojoj al Jesuo’. Kaj ĝuste tiu tasko instigis la vizitantojn krei, ene de sia propra Spiritisma Centro, alian institucion, kies nomo estis Porasista Hejmo Simono Petro. La ideo estis aprobita de ĉiuj kaj baldaŭ komenciĝis ties konstruado. La domo estis pligrandigita kaj la nova ejo, kvankam malluksa, estis preta gastigi ĝis 33 infanoj. Kun la paso de la tempo, oni aĉetis pligrandan terenon kaj konstruigis ankoraŭ pli grandan ejon kaj ĝi prenis la nomon ‘Hejmo Frateco Maria el Nazereto’, sigle en la portugala lingvo LAFRAMN (Lar Fraternidade Maria de Nazaré).

Nuntempe, LAFRAMN konsistas el pluraj konstruaĵoj kaj interalie disponigas pedagogian spacon, okupan terapion, fizioterapion, komfortajn dormoĉambrojn, lavejojn kaj kuirejojn bone ekipitajn, kio ebligas plibonon vivkvaliton al ĉiuj tie ŝirmitaj.

Estu bonvena per persona
aŭ elektronika vizito:

<http://www.laframn.org>

LAFRAMN

AMIKOJ DE LORENZ



Ĉi-numero de Komuniko omaĝas la brazilan samideanon Célso Freitas Martins, konsilanto, reviziisto kaj konstanta kunlaboranto de nia Eldonejo.

Nuntempe, li loĝas en Bolivio.

Koran dankon, kara frato!



REDAKCI-ARTIKOLO

Karaj gelegantoj, En sia 41-a jaro, Eldonejo Lorenz portas al vi plian numeron de 'Komuniko', tiel pliigante la homajn kontaktojn kaj daŭre laborante favore ne nur al bonaj agoj, sed ankaŭ al plej noblaj idealoj sopirataj de la homoj, per konstanta harmonio kun la konstruado de socio pli humana, justa kaj solidara.

Ĉi tiu informilo estas unu el tiuj agoj entreprenitaj de Eldonejo Lorenz, kiu helpas al ĝi plivastigi ties agadon per plivastigado de la homaj kontaktoj.

Ni esperas, ke Vi, kara leganto, bone profitu la vortojn de tiu ĉi modesta informilo, certaj pri tio, ke ni kundividas viv- kaj labor-idealajn, kaj dezirantaj kunĝui ilin ĉiam kun pli da homoj.

ALMANAKO LORENZ



Karaj geamikoj el la tuta mondo, se vi volos ricevi, senpage, pere de Interreto, pdf-ajn versiojn de Almanakoj Lorenz, sciigu al ni vian retadreson kaj kun granda ĝojo ni ilin sendos al vi: editora_lorenz@uol.com.br

LORENZ

"KOMUNIKOJ"

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 41-a – n-ro 165 | Januaro-Februaro-Marto 2017

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz
Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal
21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)
Telefonaĵoj: + 55-21-2452-9039 - + 55-21-2450-4768
Skajpo: Lorenz Editora | Fejsbuko: Editora Lorenz | Retadreso: editora_lorenz@uol.com.br
Retpaĝo: <http://editoralorenz.blogspot.com.br>



Kompostita de Rogério Mota

Kuriozaĵoj el la leteroj de Zamenhof



Al s-ro L. en Vilno.

En la verkoj, kiujn la aŭtoroj eldonas je sia propra kalkulo kaj respondeco, ili povas uzi tian stilon, kian ili mem volas aŭ kiun ili trovas la plej bona; tial, dezirante eldoni la fablojn de Ezopo, Vi povas en ili la artikolon tute ne uzi; multaj el niaj amikoj estas kontraŭ kaj plene aprobas Vian eŝjetadon de la artikolo, kvankam ni mem praktike venis al la konvinko, ke la esprimeco, kiun la artikolo donas al la stilo, pli ol sufiĉe kovras la neoportunecon, kiun ĝia uzado prezentas al kelkaj popoloj. En principo ni ne estas kontraŭ plena libereco de la stilo; sed konsiderante, ke nia afero estas ankoraŭ tiel juna kaj neforta, ke manko de la plej severa unueco en la unua tempo povas ĝin meti en tian danĝeron, kiun ne egalpezos eĉ la plej bonaj ennovaĵoj, ni estus pli kontentaj, se en la unua tempo deflankiĝoj de la nun ekzistanta stilo estus farataj malofte, malrapide kaj nur en la okazoj de efektiva bezono kaj ne pli frue ol pri la komuna karaktero de la fareblaj ŝanĝoj estos sufiĉe parolita en nia gazeto. Kelkaj senpaciencaj amikoj eble trovos tiun ĉi vojojn malrapida, sed “chi va piano va sano”.

Via,
Zamenhof

LA SPIRITO KIDRICKA

Waldomiro Lorenz

En la vilaĝo Dom-Feliciano, en la jaro 1931, nia najbarino s-ino Sophia Bukowski malsaniĝis kaj estis kuracita de d-ro Frederico Stich, kiu loĝis kaj kliniĝis ĉe s-ro F. V. Lorenz.

La kuracisto sekretigis la diagnozon, tamen laŭŝajne temis pri utera kancero.

Ĉar Sophia estis amikino de familio Lorenz, ĉiuj domanoj deziregis la resaniĝon de la malsanulino. Unu filino de s-ro Lorenz, Ana Luiza, tre pia knabino, ĉiutage preĝis por la resaniĝo de sinjorino Sophia. Unu tagon, kiam Ana faris sian pian preĝon en la ĝardeneto antaŭ la domo, ne atendite ekaperis Spirito, ĉirkaŭita de luma aŭreolo. Ŝi tuj rekonis sinjorinon Kidricka, patrino de Sophia. Ana rapide vokis sian patron Francisco Waldomiro Lorenz, kiu ankaŭ vidis la Spiriton, kaj aŭdis de ĝi dankajn vortojn pro la preĝoj kaj deziresprimoj por la resaniĝo de ŝia filino Zofja. La aperaĵo klare diris “Zofja”, anstataŭ “Sophia” (portugale), kiel ŝi estis konata!

Kion pensas la nekredema leganto?

Invitilo

Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj en Pardubice elkore invitas vin al la 7-a Internacia Kongreso de AEH, kiu realiĝos en ripoza centro Zámeček (Kasteleto) en Hodonín ĉe Kunštát en la tagoj de 21-a ĝis la 23-a aprilo 2017 kun sekvanta lingva seminario ĝis 28-a de aprilo 2017.

La ripoza centro Zámeček estas plene senbariera kun liftoj, sociaj salonoj kaj gimnastikejo. La tranoktado estas en 2-ĝis 4 litaj ĉambroj kun lavujo. Necesejoj kaj duŝoj estas en koridoroj.

La temo de la kongreso estas: tolero – limo de tolero – interhomaj rilatoj.

Telefono por demandoj: Angelová +420 775 323 903

Retadreso: aeh@esperanto-aeh.eu



KUNLABORU! – Membroĝi ĉe ASOCIO LORENZ kaj helpu la disvastigon de Esperanto kaj Spiritismo en la tuta mondo!

COLABORE! – Torne-se membro da ASSOCIAÇÃO LORENZ e auxilie a divulgação do Esperanto e do Espiritismo em todo o mundo!

20-A AGO-TAGO DE EKOR – ESPERANTA KUNFRATIĜO DE OKCIDENTA REGIONO – KARNAVALO KAJ MUZEO DE LA MORGAŬO

Nia Ago-Tago en la 04-a de marto 2017 estis absolute surpriza! La vetero estis mirinde agrabla kaj la ĉielo belbrilegis. Nia grupo konsistis el nur kvin e-istoj el la okcidenta regiono de Rio-de-Ĵanejro. Tamen, ni multon povis fari.

La urbo estis plena je turistoj en- kaj ekster-landaj, plejparte ĝuantaj la finiĝon de la karnevalo, kio, unuarigarde, montriĝis malfavora al nia celo. Tamen ĝi fruktodonis, duarigarde.

De nia renkontiĝejo, en la halo de la Centra Fervoja Stacidomo, kaj dum la longa promenado ĝis Placo 'Mauá', kie ni deĵoris, ni kaptis la oportunon por distribui faldfoliojn al la turistoj, starantaj laŭlonge de la Avenuo Presidento Vargas, gapantaj antaŭ tiom belaj, grandiozaj kaj kreivaj karneval-ornamaĵoj. Tiel ni enmetis E-on en la Karnavalon de Rio-de-Ĵanejro, per la flagoj de EKOR kaj de E-o.



Alveninte al Placo 'Mauá', nin atendis granda surprizo: temis pri la bela kaj impona konstruaĵo de la Muzeo de la Morgaŭo kun centoj da turistoj ĝin vizitantaj. Tiam, do, ni kontaktis la ĉiĉeronojn kaj de ili ricevis permeson disdoni al la vizitantoj nian faldfoliojn Kio estas Esperanto, kies plurlingveco faciligis la kontaktojn kun neportugallingvanoj.

Dummatene ni disdonis centojn da faldfolioj kaj konstatis interesigon flanke de multaj turistoj, kio permesis al ni taksi la taskon sukcesa.

Ni esperas, ke en la proksima Ago-Tago, okazonta en oktobro de ĉi-jaro, ni povos kalkuli je kunlaboro de pli da s-anoj el aliaj urbopartoj, por kune daŭrigi la disvastigadon de E-o niaurbe.

M.O. Silva – Direktoro de EKOR

INFORMILOJ

Ni regule ricevas kelkajn alilandajn informilojn, portantaj kuriozaĵojn, noticojn, kulturaĵojn ktp.

El inter ili, ĉi-foje ni donas reliefon al Teranido el Sud-Koreio kaj Informilo el Ĉeĥio.

Gratulojn al ties eldonantoj por la grava laboro!



NI REKOMENDAS

Radio Vaticana - Esperanto

Via Radio-Arkivo enhavas pli ol 1800 elsendaĵojn

Adreso: <http://www.radio-vatikana-esperanto.org/>

ĈU VI ANKORAŬ NE REALIĜIS POR 2017?

Se vi ankoraŭ ne realiĝis, ne forgesu, ke via jara kontribuo treege helpas nin eldoni spiritismajn verkojn en Esperanto kaj ilin sendi, tute senpage, al niaj eksterlandaj samideanoj.

Kaj vi, kara amiko, kiu neniam aliĝis, petu informojn kaj kun granda plezuro ni vin sciigos pri la laboro de nia Eldonejo

kaj kion vi, kiel nia ano, ricevos en la komforto de via domo. Skribu al ni:

editora_lorenz@uol.com.br

(21) 99058-4028 (ZAP)

(21) 2452-9039 / 2450-4768

LORENZ

DOKTORO GUILHERME TAYLOR MARCH, LA PATRO DE LA MALRIĈULOJ

Eurípedes A. Barbosa



Guilherme Taylor March naskiĝis en Terezopolo, ŝtato Rio-de-Ĵanejro, la 21-an de aŭgusto 1838. Li studis medicinon en la sama urbo kaj diplomiĝis la 30-an de novembro 1859. D-ro March – klera, studema – estis poligloto, inkluzive scipovis Esperanton.

D-ro March edziĝis al Francisca de Paula Correia March en Rio-de-Ĵanejro, en la jaro 1860. Iom poste li transloĝiĝis al Niterojo, kie li oficis kiel kuracisto. Li havis grandnombran klientaron, kaj al ĉiuj li zorgeme sin dediĉis postulante nenian pagon.

Li suferis variolon kaj resaniĝis danke al la zorgoj de iu spiritistino, kiu kuracis lin per homeopatia medikamento. La kuracado plene sukcesis, eĉ sen la cikatroj, kiujn la variolo ordinare estigas sur la haŭto de siaj viktimoj. Pro tio, March fariĝis homeopata fakulo ĝis sia morto. Li profunde interesiĝis pri homeopatio kaj interŝanĝis homeopatiajn konojn kun eksterlandaj kuracistoj per korespondado en Esperanto.

Li konatiĝis kun la medio Nascimento, kiu estis peranto de spiritoj en kuracado de malsanuloj. La sindediĉo, la humileco kaj la pozitivaj rezultoj de la mediuma agado de Nascimento varbis d-ron March al studado de la Spiritisma Doktrino. Li fariĝis konvinka spiritisto, laŭ atesto de sia filo Edmundo March, en letero datita de 22 de septembro 1940. March estis amiko de tiamaj eminentaj spiritistoj, inter ili la doktoroj Faria Júnior kaj Filgueiras Lima.

Li tute sin liberigis de materiala intereso, ĉar li sin dediĉis tage kaj nokte al zorgado de malsanuloj, ĉefe de malriĉaj malsanuloj. Pro tio d-ro Guilherme estis alnomita “kuracisto de malriĉuloj”. Dum pli ol 50 jaroj, li laboradis en la medicina kampo kun granda amo al la homoj kaj forĝis sin mem, inkluzive sian propran sanon. Vasta estis lia kontribuo al medicino. Tiu bonkora homo fakte vivis laŭ la evangeliuj instruoj de Jesuo.

D-ro March laboris kiel dungito nur en la hospitalo nomata “Santa Casa de Misericórdia” (Hospitalo de Malriĉuloj), en Niterojo. Lia klientaro estis granda, sed doktoro March preskaŭ ne ricevis monon por sia laboro favore ĉefe al mizeruloj. Al li fariĝis malfacila la lupago de la domo, kie li loĝis. Do loĝantoj en Niterojo kolektis monon kaj aĉetis domon, por donaci al li. Kelkaj sinjorinoj donacis la meblaron. Lia hejmo transformiĝis je hospitalo, ĉiam malfermita al malsanuloj. Dum preskaŭ 30 jaroj, la kuracisto de la malriĉuloj loĝis en tiu donacita domo.

Kiel dirite, doktoro March bone posedis Esperanton. En januaro 1914, eminentaj brazilaj esperantistoj vizitis lin hejme.

La revuo *Brazila Esperantisto*, eldono de januaro/februaro 1914, paĝo 5, informas pri la afero:

“En januaro komisiono konsistanta el f-ino Julia Fernandes, d-roj E. Backheuser kaj Couto Fernandes, je nomo de esperantistoj de Rio, faris viziton en Nicdtheroy al d-ro March, konata laŭ la nomo kuracisto de malriĉuloj. Li estas malnova esperantisto kaj, malgraŭ maljuna kaj tre malsana, li korespondas kun multaj amikoj, en Esperanto.”

D-ro March grave malsaniĝis kaj restis surlite dum preskaŭ 20 jaroj, sen plendoj kaj ribelo kontraŭ tiu malsano.

La 21-an de junio 1922, en la aĝo de 84 jaroj, forpasis la apostolo de la bono. Lia enterigo estis apoteoza evento. Amaso da homoj akompanis lian korpon ĝis la tombejo. La funebra procesio marŝis malrapide pro la popolamaso sur la strato. Ĝi daŭris pli ol ses horojn. Ordinare, ĝi daŭrus ĉirkaŭ 30 minutojn.

La Urbodomo elspezis la koston de la funebra ceremonio kaj ordonis la hisadon de la urba flago dum 48 horoj. *Brazila Esperantisto* (majo/junio 1922) publikigis la koncernan nekrologon:

“En la 21-a de junio mortis en Niteroi, je la aĝo 84 jaroj, d-ro Guilherme March, fame konata kiel ‘kuracisto de la malriĉuloj’.

Li estis unu el la plej malnovaj brazilaj esperantistoj kaj bone parolis Esperanton kaj multajn fremdajn lingvojn.

Granda popolamaso akompanis tiun bonfarinto al la lasta ripozejo.”



Doktoro Guilherme Taylor March

ZAMENHOFA FESTO 2016



Esperanto-Asocio de Florianópolis, en Brazilo, kunvenis por festi la Tagon de Zamenhof. Ĉeestis la estraro de la asocio kaj kelkaj E-gelernantoj. Tiel ni disvastigis Esperanton.

(Informis: Antônio Félix)



Prof. SO Jinsu (Sud-Koreio), kiu, pro diversaj kialoj, ĉeestis la ĵus pasintan 6-an Afrikan Kongreson de Esperanto de UEA dum tri tagoj kun la karavano el Azio, sukcesis realigi 6-minutan filmeton pri kelkaj dumkongresaj

programeroj. En la filmo kelkaj kongresanoj donis intervjuojn pri siaj impresoj. Spektu la videon por havi ideon pri la kongresa etoso. Jen la ligilo al ĝi: <https://www.youtube.com/watch?v=WXYRlSGNdco>

FILMETO



SENPAĜAJ LIBROJ...

Ĉiuj kiuj loĝas ekster Brazilo rajtas ricevi niajn librojn, en Esperanto, tute senpage. Sufiĉas nur sendi vian kompletan nomon kaj poŝtadreson al editora_lorenz@uol.com.br